1-a Jaro, N.ro 14 APERAS SEMAJNE 1. Januaro 1925

ESPERANTO je la servo S.A.T. de la tutmonda PROLETARO

# SENNACIULO

Oficiala organo de Sennacieca Asocio Tutmonda

La abonprezaro kaj reklamtarifo troviĝas sur la lasta paĝo — Neuzitajn manuskriptojn ni ne resendas. — Represo de artikoloj permesata nur se oni citas la nomon de nia organo, kaj se oni sendas al la Red. du ekz. de la gazeto enhavanta la koncernan represaĵon. — Ponumera prezo: 0,05 dol.

| Redaktoro: N. BARTHELMESS<br>Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz | Gvidanto: E. LANTY<br>24, Boulevard Beaumarchais, Paris XI. | Administranto: R. LERCHNER<br>Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz |
|---|---|---|

## Nova Jaro — Nova Laboro

Jaro 1924 alportis al ni sukcesojn. Kvankam ne sufiĉe grandan nombron da novaj adeptoj, membroj kaj abonantoj — pri ilia statistiko ni ne povas esti kontentaj — sed tamen konsiderindan kreskon de nia influsfero. Precipe lastaj monatoj, lastaj semajnoj — komencante de la IVa kongreso, dum kiu estis formulata la ofensivplano laŭ praktikaj metodoj — progresigis nian aferon, certigis nian venkon je 2/3 oj ĉe multaj prolet-organizaĵoj.

Kiu volas resti malantaŭe en tiu momento, kiam estas nia tasko pruvi per la praktiko la taŭgecon kaj utilecon de nia movado por la proletaro, en momento, kiam la celo lumas tiel proksime? Esti Satano signifas *aktive* kunlabori en la konstruo de nova socio! Nia batalo, kiu montras diversajn fazojn de evoluo, nun eniris la plej gravan fazon, en kiu ni devas elmontri, ke ni ne fanfaronas, ke ni ne faras vanajn promesojn, sed ke ni fakte scias plenumi, kion ni estas promesintaj, ke ni scias utiligi la ilon esp. en la servo de l' tutmonda proletaro.

Ĉu tio ne vekos eĉ la lastan dormanton en niaj vicoj, kiu forgesas, ke malgranda, relative tre malmultnombra organizaĵo, kia estas SAT, nepre bezonas la subtenon de *ĉiu* sia membro, por efektivigi sian programon? Pripensu tion ĉiu el vi kaj disponigu liberajn fortojn *pli* ol ĝis nun al la SAT-afero. Dum en la polemikado kaj teoriado bedaŭrinde tro multe oni agadaĉas, skribas kaj babilas je malprofito de la movado, la pozitivan faron oni malatentas, per tio malbone servante al la asocio, al la komunaj interesoj, precipe en nuna horo, kiam SAT bezonas ĉiujn fortojn, por montri sian povon kaj dispeli ĉiujn skeptikajn opiniojn kaj kontraŭstarojn de hezitemuloj kaj nekonvinkitoj.

Do, — nia voko iras al ĉiuj:

*Faru ni nian laboron — kaj la venko estos nia!*



Proletaro rompos siajn ĉenojn

## Politiko de nova registaro en Anglio

La personaro de nova registaro per si mem jam atestas pri karaktero, kiun havas la politiko de nova ministraro. La enlanda politiko jam havas ne dubeblajn signojn de l' daŭra reakcio, dum kiu ĉiuj atakiloj estos direktitaj kontraŭ laboristaro kaj nacia movado. La eksterlanda politiko certe estos direktata laŭ "hereditaj" principoj, kiuj dum regado de Makdonald preskaŭ neniam diferencis de antaŭaj jaroj.

En la publikitaj paroloj dum bankedo ĉe Londona urbestro Bolduin kaj liaj kolegoj jam donis sufiĉe klarajn konturojn pri la programo de nova registaro.

"La enlanda kaj eksterlanda politiko de nova registaro estas karakterizata de la principo — plifortigo de influo de Brita Imperio kaj firmigo de l' ligiloj inter metropolio kaj regataj (dominataj) landoj", — jen estas la esenco de jam faritaj oficialaj deklaraĵoj.

Angla burĝaro perfekte scias, kie estas la plej malsana loko de Anglio. Ĝi ne povas "malrimarki" tion, kion oni konstatis jam en la tuta mondo, ke la kolonioj kaj dominatoj (*dominions)* elmontras fortan tendencon por liberiĝo el angla protektado. Dum lastaj jaroj tiu tendenco estis la plej aktiveca kaj ekz. en Hindio kaj Egiptio kreskigis ribelemon kontraŭ Anglio.

Kiel la nova registaro intencas lukti kontraŭ tiu tendenco? Kio okazos al Anglio, kiam ĝia politiko ne plu estos bazata sur apogo je potencaj kolonioj? Ĝi neeviteble fariĝos duagrada regno, kiel izolita eŭropa lando. Ĝia enlanda ekonomia stato estos malpli bona de kiam angla burĝaro ne povos korupti laboristan aristokration per produktaĵoj el forta ekspluatado de koloniaj popoloj.

Bolduin deklaris, ke baldaŭ estos ripetita granda ekspozicio en Wembley, — tiu manifestaĵo de dekadanta imperialismo de Anglio. Oni nepre devas kredigi al angla popolo ĝian potencon, kiam ĝi riskas perdi la lastan. Tiu ĉi ekspozicio kostis centojn da milionoj da funtoj... Se oni decidas ĝin daŭrigi, tio atestas, ke ĝi ne atingis la deziratan rezulton...

701.820-7.Esp.M 1925-26
1-3

Tiu ĉi ekspozicio, — laŭ parolo de Bolduin, — montris al milionoj de enlanduloj la vivrimedojn de Brita Imperio kaj eventualajn perspektivojn de ĝia progreso.

Dum la sama bankedo unu el ministroj parolis pri organizenda komunikado per aerŝipoj inter ĉiuj ĉefurboj de Brita Imperio, — ĉar . . . la perfektigo de aerkomunikado helpos solvi kelkajn malfacilajn kaj urĝajn demandojn en proksima Oriento . . .

Bolduin mem estas pli sincera. Parolante pri hinda problemo li interalie menciis: "la politikaj ekstremistoj per sia taktiko celas kontraŭ la nuna konstitucio . . ." do li tute aprobas indignindajn punagojn de angla landestro en Hindio lordo Reding. Se oni konsideros la fakton, ke fakestro por aferoj de Hindio estas fama lordo *Birkenhed,* tiam oni povos aserti, ke en proksima estonto laboristoj kaj agristoj de Hindio spertos pli kruelajn persekutojn, ĉar laŭ vortoj de Bolduin mem, tion antaŭ-sankcianta, — „. . . la registaro de Lia Reĝa Moŝto subtenos ilin (t. e. punrimedojn de anglaj regantoj en Hindio) per la tuta aŭtoritato . . ."

Pri la demandoj de l' eksterlanda politiko la angla ĉefministro parolis per dubsenca lingvo de l' diplomatoj. Sed estas tre karakterizaj por nuna momento tiuj tre akraj kritikoj de oficialaj ĵurnalistoj kiuj aperis en freŝdataj ĵurnaloj kontraŭ projekto de Dawes kaj daŭranta diskutado pri franc-germana ekonomia kontrakto, kiuj senteble tuŝegas interesojn de l' angla industrio. Notinda estas ankaŭ la fakto, ke la franca ambasadoro ne estis reprezentita ĉe l' menciita bankedo.

Dume anstataŭ angla-soveta kontrakto miskreditita de nuna registaro, estas aranĝita angla-germana ekonomia interkonsento. *3637.*

## Letero el Estonio

*(Prokraste raportita de nia korespondanto pro la intertempaj okazintaĵoj. — Red.)*

Hodiaŭ mallonga priskribo, kiom nun estas eble ĉe ni. La proceso (vidu n.o 11) estis finata (39 akuzitoj estis kondamnitaj je dumviva punlaboro, la ceteraj preskaŭ ĉiuj je multjara malliberejo, nur 7 liberigitaj), sen ke iu estus reaginta tion. La normala vivo senĝene daŭris, nenio lasis antaŭsenti nin, kiaj eksterordinaraj okazoj, kies sekvojn ni nun travivas, atendas nin; ili memorigas nin pri la plej teruraj paroksismoj de la cara reakcio.

Ni jam raportis pri atakoj de la reakcio, kiu persekutas ĉi-lande la laboristan movadon. Sed nun ne plu temas pri tio. En Estonio nun regas la plej terura blanka teroro, kiu ne estas malpli terurega ol tiu en Hungario kaj Bulgario. Ĝia sola celo estas la subpremo de la revolucia movado. La laborista movado nun ne nur estas persekutata, sed fakte detruata, ekstermata. La aferon ja ĉiuj pli malpli konas laŭ la ĵurnalaj sciigoj, tial ni kontentiĝas, per malmultaj linioj skizi la okazintaĵojn.

La 1an de decembro estis farata provo, renversi la registaron. Dum la matena krepusko provis 5—10 personaj grupoj de aktivistoj (aktivuloj) transpreni la registarajn kaj militistajn aŭtoritatojn kaj terorigi la policon. La provo nekredeble facile prosperis: la stacidomo, la poŝtejo, la milita ministrejo kaj ĉiuj registaraj aŭtoritatoj venis en manojn de la atakantoj preskaŭ senkontraŭstare dum 2—3 horoj. Malgraŭ la bone organizita policanaro neniu sciis ion pri la atako, ankaŭ la polico ne estis rimarkinta, ke jam plurajn tagojn antaŭ la 1a de decembro malgrandaj grupoj de aktivistoj el Sovet-Rusio estis venintaj trans la limon unu post la alia kun armiloj kaj municio. Krom la okupo de la registaraj ejoj la aktivistoj sukcesis ekposedi du aeroplanojn; unu tamen alteriĝis 3 kilometrojn de la rusa limo, kaj ĝia pasaĝero estis arestata kaj baldaŭ poste ekzekutata.

Ĉiuj konsentas unuanime, ke la organizo de l' ribelo estis bonega, ĉar alie ja neniu estus sukcesinta, okupi per tiel malmultaj homoj samtempe tiom da registarejoj. Tamen ĉio estis vana, nun ĉio denove estas en la manoj de la reakciuloj, kaj la tuta lando suferas je la sekvoj de la malsukcesa provo, proklami ĉi tie la laboristan regadon: la provo ŝajnas esti tro frue farita, la alvenintaj aktivistoj ne sciis precize, kiel grandan subtenon ili ĉi tie povas esperi, ĉu la soldatoj emas ilin aliĝi ktp. Nur tiu ĉi riproĉo ŝajnas meritita, se oni entute povas paroli pri riproĉoj.

Nun en la tuta lando regas militstato, precipe en la provincoj, kie oni nur ĝis la oka horo vespere rajtas sin montri ekster sia domo. En la registarejoj ĉie gardostaras policanoj kaj militistoj, en la vagonaroj la legitimiloj estas kontrolataj, regas milita cenzuro ktp. La blankuloj ree formis ŝirmligon, kiu devas defendi kaj ŝirmi la nun regantan registaron. Oni nun serĉas la krimulojn: la danĝero esti arestata kaj mortpafata minacas ĉiujn laboristojn, kiuj hazarde ne estis ĉe sia ordinara laborejo la 1an de dec.; al la majstroj kaj ĉeflaboristoj estas ordonite denunci ĉiujn revoluciemajn laboristojn ktp.

Ĉiutage novaj ordonoj estas dekretataj, unu pli severa eĉ ol la alia. Oni ellaboras leĝon, kiu malpermesas ĉian laboristan movadon, escepte la ŝtatsocialistan. Sed nun nokton post nokto laboristoj estas arestataj, kaj ili ĉiuj malaperas tiel, ke neniu scias kien; al la familianoj nenio estas sciigata pri ties sorto. Samtempe oni aŭdas nokte nedubsencajn pafojn, kaj oni kaŝe rakontas, ke unu arestito post la alia estas forbuĉata, ĉar tian amasan murdadon nomi ekzekuto, estus do peko. Antaŭ nelonge oni respondis al unu, kiu volis porti manĝaĵojn al sia arestita parenco, ke tio nun "ne plu estas necesa". — Ĉefe oni nun serĉas la aktivistojn, inter kiuj, kiel oni diras, troviĝas multaj el la Rusion ekzilitoj. Oni trovas ankaŭ de tempo al tempo malgrandajn grupojn, kelkaj malvivaj, aliaj vivantaj, sed nek la stabo, nek la presejoj estas trovitaj. Nun entute ĝenerala "revizio" estas farata. Oni rakontas, ke la registaro ne povas doni plenan konfidon al la militistaro, ke kelkcent soldatoj estas mortpafitaj, ankaŭ du oficiroj, kiuj ne sufiĉe severe traktis la atakintojn. La laborista domo estas enirebla "pro nekonataj kaŭzoj", sed ankaŭ tie oni faris fundan revizion — tie regas malordo post la "vizito". Sed nur malmultaj vizitas ĉi tiun domon: kelkaj ne kuraĝas eniri, aliaj estas arestitaj, eble eĉ malvivaj, aliaj tenas sin kaŝitaj.

Resume — ne plu ekzistas laborista movado en Estonio. En la tuta vasta mondo nun la malgranda demokratia Estonio fariĝis infero por ĉiu progresema laboristo. La sola espero, kiun ni havas, estas la konvinko, ke, kvankam forbatitaj por certa tempo el la vico de batalantoj, ni tamen povas esti certaj, ke la kamaradoj en aliaj landoj ne malatentos la lecionon en Estonio kaj ankoraŭ pli kuraĝaj ol ĝis nun daŭrigos la bataladon pro la komunaj idealoj.

*Nemo.*

## TRA LA KLASBATALO

K.do Erich Mühsam, la konata poeto kaj batalanto de proletaro, kiu post la bataloj en Bavario 1919 estis malliberigita, nun estas amnestita kaj brile akceptita de la revoluciularo en Berlin.

Infanoj de la ILH revenintaj de Paris, kie ili estis gastigitaj ĉe laboristoj, estis akceptataj demonstracie sur la stacidomego de Leipzig (SAT-rap. Leipzig).

Partikongreso de Germana Socialdemokrata Partio de *Polio* akceptis unuanime rezolucion por esperanto (Teksto sekvos).

En Maroko la hispana faŝista diktatoro Primo de Rivera suferis unu malvenkon post alia kontraŭ la ribelantaj gentoj.

Soermus, la fama "ruĝa violonisto", estas devigita, forlasi ĝis 31. 12. Anglion.

**Studu la informojn de l' Ekzekutiva Komisiono sur paĝoj 6 kaj 7**

ÖSTERR. NATIONALBIBLIOTHEK WIEN

# Industrio, terkulturo kaj eksporto de l'homa labor-energio en Italio

Laŭ freŝdataj statistikaj bultenoj, la ĉiujara pliiĝo de loĝantaro en Italio atingas ĉirkaŭ 500 000. Tio signifas ke post 10 jaroj la lando havos 45 milionojn da loĝantoj. Ĉe tiuj kondiĉoj al Italio minacas nenia danĝero ke la lando restos sen tiu trezoro, kiun prezentas la homa energio, — la homa laborforto. Sed la danĝero ĝin minacas de l'alia flanko, kaj en jus konstatita fakto kuŝas la kaŭzo de ĝiaj proksimdataj malfacilaĵoj.

Por nutri ŝian loĝantaron Italio kulturigas sub diversaj grenplantoj ne malpli ol 92% de l'tuta teritorio. Nekulturataj restas nur marĉoj, lagoj kaj montĉenoj. Oni ne povas diri, ke la terkulturo en Italio progresas malrapide aŭ neniel progresas.

La milito sendube tre malutile influis la ekonomion. Tamen la samaj statistikaĵoj pruvas, ke la produktado de ekz. tiom bezonata tritiko atingis antaŭmilitan ciferon. Jen estas statistika ilustraĵo, karakterizanta la progreson de l' terkultura produktado en Italio dum lasta jardeko:

| Jaroj | Surfaco de plantata areo miloj da hektaroj | Produktado en milionoj da centfuntoj | Plio de importo super la eksporto (miliono da centfuntoj) | La tuta kvanto de la greno en la lando |
|---|---|---|---|---|
| 1913—14 | 4 777 | 58,4 | 11,1 | 69,5 |
| 1914—15 | 4 769 | 46,1 | 14,9 | 61,0 |
| 1918—19 | 4 366 | 49,9 | 18,9 | 69,8 |
| 1922—23 | 4 649 | 44,0 | 29,8 | 73,8 |
| 1923—24 | 4 676 | 61,2 | 19,0 | 80,2 |

Se oni konsideras ankaŭ la pliiĝon de loĝantaro dum la sama periodo, oni povos kompletigi tiun ĉi tabelon per jenaj ciferoj:

| Jaroj | Nombro de loĝantoj (milionoj) | Kvanto da tritiko por ĉiu kapo |
|---|---|---|
| 1913—14 | 35,6 | 179,4 kilogram. |
| 1914—15 | 36,1 | 152,5 „ |
| 1922—23 | 36,0 | 176,8 „ |
| 1923—24 | 39,6 | 188,2 „ |

La evidentaj sukcesoj en agrikultura ekonomio dum lastaj jaroj estis la kaŭzoj de troaj esperoj. Optimistoj konkludis, ke rilate al tritiko Italio povos ne plu bezoni la importon. Tamen tiu ĉi opinio estas facile refutebla per jena konkludo. Meznombra rikolto de la lando nun estas karakterizata per "ronda" cifero 48 milionoj da centfuntoj ĉiujare. Se la loĝantaro de Italio post 10 jaroj plikreskos nur ĝis 44 milionoj kaj se la meznombron de konsumata greno por ĉiu homo oni fiksos je 170 kg. dum jaro, tiam la lando por nutri siajn loĝantojn bezonados ĉiujare 75 milionojn da centfuntoj + 6 milionojn por semado, do entute 81 000 000 centf.

Estas tute evidente ke kreskigi la produktadon de l'tritiko de 48 milion. ĝis 81 milion. dum nur 10 jaroj estas espero neefektivigebla. La lando estas fatale destinita por ĉiama importado de tritiko.

Malgraŭ, ke oni kulturigas ĉiun taŭgan terpecon, la lando rifuzas nutradon al ĉiam pli granda kvanto de siaj loĝantoj.

La natura postsekvo de tiu ĉi faktoro estas konstanta elmigrado en eksterlandon, precipe en Amerikon. Atinginte per rapida kresko dum XX. jarc. ciferon de 873 000 homoj en 1913, la elmigrado ankoraŭ pli rapide kreskas post la milito. La elmigruloj, kiel homa laborenergio, fariĝis unu el la plej grandaj objektoj de l'itala eksporto, kiel diris Nitti.

La pago por tiu ĉi "varo" venas en formo de l'alilanda valuto, transsendata de l'elmigrintoj al siaj parencoj en la patrolando. Tamen la eksporto de l'homa labor-energio malgraŭ la bona bilanco estas la plej neproduktiva rimedo por ĝin ekspluati. Ĝi estas senprofita, kiel ekz. vendo de l'nerikoltitaj grenplantoj antaŭ ilia maturiĝo. Do la elmigrado estas unu el la negativaj fenomenoj en ekonomia vivo de Italio.

Kio povas esti la rimedo por okupi ĉiujn laboristajn masojn en ilia patrolando? Ĉiuj ekonomistoj perfekte konscias, ke la sola rimedo estas rapida disvolvigo de l'enlanda industrio.

Efektive, itala industrio, malgraŭ vico de daŭraj krizoj, ĉiam disvolviĝas. La tempa koincido de ĝiaj krizoj kun tiuj de aliaj industriaj landoj jam per si mem pruvas pri "maturiĝo de l'lando por progresanta kapitalismo." La jena tabelo, kompilita laŭ freŝdate publikitaj oficialaj statistikaĵoj, karakterizas la industrian disvolviĝon de Italio.

| Jaroj | Akciaj s-toj kune | | Minejoj | | Metalurgiaj entreprenoj | | Elektro-industrio | | Maŝinoj kaj Ŝipoj | | Kemia industrio | | Silka industrio | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | Kvanto | Kapitalo en milion. or. lir. | Kvanto | Kapitalo en milion. or. lir. | Kvanto | Kapitalo en milion. or. lir. | Kvanto | Kapitalo en milion. or. lir. | Kvanto | Kapitalo en milion. or. lir. | Kvanto | Kapitalo en milion. or. lir. | Kvanto | Kapitalo en milion. or. lir. |
| 1913 | 2882 | 5170 | — | — | — | — | — | — | — | — | — | — | — | — |
| 1915 | — | — | 23 | 94 | 41 | 158 | 117 | — | 51 | 174 | 76 | 204 | 9 | 36 |
| 1922 | 7683 | 23750 | 83 | 289 | 88 | 574 | 184 | 2obla | 153 | 969 | 162 | 400 | 36 | 190 |

Oni vidos, ke dum 7-jara periodo la kvanto de l'entreprenoj kaj ties kapitaloj pligrandiĝis 2-, 3-, 4- kaj pli-oble. Tiu ĉi disvolviĝo de l' industrio estis ankaŭ akompanata de l'koncentriĝo de kapitalo. La altgrada kresko de l' industria, produktanta, transportanta aparato estas karakterizata ankaŭ per pligrandiĝinta konsumado de l'elektra energio por industrio: 1,3 milionoj da ĉevalfortoj en 1914 kaj 2,2 milionoj en 1922; la komerca ŝiparo kreskis de 1428 mil. en 1914 ĝis 2676 mil. en 1924. Malgraŭ evidentiga elokventeco de ĉiuj ĉi ciferoj, la disvolviĝo de itala industrio estas pli malrapida ol "la proceso de liberiĝo de laborfortoj" el terkulturo. Ĉiam kreskanta eksporto de l' "hom-varo" el Italio evidentigas tion. Por elimini tiun ĉi negativan faktoron, oni devas kreskigi la enlandan industrion pli rapide. Kaj ĝuste por tiu plirapidigo de l'industria progreso estas kunigitaj lastatempe ĉies penoj kaj ekonomiaj fortoj de la lando.

Italio obstine serĉas alilandajn merkatojn. Nur sub la ekonomia premo de tiu neeviteblo ĝi konfirmas ekonomian kontrakton kun Sovet-Unio; de tie ankaŭ venas la tendenco reguligi komercajn rilatojn kun Ĉeko-Slovakio kaj Jugo-Slavio. Sub la influo de l'sama bezono, Italio unuan fojon en sia historio elpaŝas kiel la lando, kiu pruntedonas al eksterlando: pruntedono al Pollando kaj Rumanio. Kiam tio estas necesega, Italio, kiu estas la lando kun internaj provincaj doganimpostoj, neniigas eĉ impostojn por importaĵoj: ekz. tiel ĝia registaro faris rilate al Svislando, de kie oni importas ilaron por ĉiam grandigata reto de hidraŭlikaj-elektraj uzinoj.

Tamen la disvolviĝo de industrio en Italio renkontas certan limon ĉe malsufiĉo de l'karbo kaj fero. Sen tiuj fundamentaj elementoj por t. n. "peza" industrio ne povas disvolviĝi ankaŭ cetera enlanda industrio. Do estas kompreneblaj tiuj penegoj, kiujn elmontras Italio por eviti tiujn obstaklojn.

Malsufiĉo de karbo kaŭzis vastan aplikon en metalurgio de perelektraj varmigiloj. Oni kalkulas ĉirkaŭ 180 elektrajn fornojn ĉe 50 uzinoj. Produktado de l'elektroŝtalo atingas milionan ciferon de tunoj ĉiujare.

Kompreneble la uzado de l' teknikaj perfektigaĵoj donas nur paliativon, kiu ne povas anstataŭi la necesegajn karbon kaj feron. Kaj jen internaciaj ekonomistoj konstatas ne-

ordinaran fenomenon: elmigrado de l' metal-industria kapitalo en eksterlandon, kie ĝi akiras fer- kaj karb-minejojn.

Antaŭ la milito italaj entreprenistoj farmis karbo-minejojn apud Dambrova (en Pollando). Fama *koncerno Ansaldo* malsukcese provis organizi la liveradon de karbo el Ĉeko-Slovakio. Fine, plej freŝdate organiziĝis konsorciumo "Mercantile Italiano", kiu uzas italan kapitalon por ekspluati karbminejojn en nordorienta Silezio. Ĉu tiuj provoj havigos la deziratan rezulton? Tamen, spite je propraj bezonoj nuna itala registaro cedis al amerikanoj naftozajn areojn, kiuj per propra ekspluatado povus havigi al enlanda industrio anstataŭajon de l' necesega karbo.

Kun tiaj malfacilaĵoj kaj eraroj okazadas la transformiĝo de Italio je la lando kun altgrade progresanta kapitalismo. La alian obstaklon sur tiu ĉi vojo, krom diritaj faktoroj, Italio renkontas en la fakto, ke la lando estas relative malriĉa je propraj liberaj kapitaloj. Sed ĝi jam uzas kontraŭ tio la ordinaran rimedon: penetrigon de l' alilanda kapitalo. Por disvolvigo de l' industrio oni prunteprenas en eksterlando. Iom post iom, en maskitaj formoj aperas en Italio amerika kapitalo. Sed la analizo de tiu ĉi demando povos esti la temo de alia artikolo.

*N. Krassovskij*

## La verko de Samuel Gompers[1])

La 44a reelekto de Sro. Samuel Gompers ĉe ĝia ĉiujara kunveno kiel prezidanto de Amerika Federacio de Laboristaro pruvas la reakciemon de ĉi-nomita organizaĵo.

Organizita 1881, kiam la "Kavaliroj de Laboro" estris la usonan laborist-movadon, la AFL estis devigata trovi lokon por si en la rapide evoluanta vivo ekonomia de Usono. "La Standard Oil Kompanio" ekzistis nur 11 jarojn; la trustmovado tial nur estis embristata. Konkurado en la ekonomia mondo estis malaperanta; monopolo estis naskiĝanta.

La "Kavaliroj de Laboro" elprovis koncentriĝon kaj disciplinon, sed sen kontentiga rezultato; la Federacio estis malcentrigita unuiĝo de sendependaj laborul-unuiĝoj; ĝi ne enmetis en sian agadprogramon nek en sian organizmetodon klas-antagonismon. Anstataŭ tio ĝi postulis "justan tagsalajron por justa taglaboro" — pli mallongajn laborhorojn, pli altajn salajrojn, pli bonajn laborkondiĉojn. Tio signifas, ke la gvidantoj de l' Federacio ne okupis sin pri esploro de principoj, je kiuj la politika sistemo estis organizita. La Federacio tial neniam estis batalanta klasorganizaĵo. Ĝia celo ne estis detrui kapitalismon nek eĉ kripligi ĝin, sed pli ĝuste kunĝui kun la mastra klaso la grandajn riĉaĵojn kiuj estis elĉerpotaj per la konkiro de virga kontinento. La membreco de Sro. Gompers kiel ano de la agadkomitato de la "Nacia Civit-Federacio"[2]) pruvas la interklasamikecon.

La unuaj 16 jaroj de ekzisto alportis al la Federacio 265000 membrojn, kaj la Hispan-Usona milito de 1898 kaj la imperialismo kiu sekvis ĝin, plialtigis la nombron ĝis 750000 en 1901 kaj ĝis 1466000 en 1903. Dum la sekvintaj dek jaroj la nombro alterne plialtiĝis, kaj plimalaltiĝis, la plej malalta nombro estis 1454000 en 1906 kaj la plej alta 1770000 en 1912. — Ĉe la komenco de grandmilito la nombro estis pli ol du milionoj, kaj ĝi plialtiĝis ĝis 4,079000 en 1920 — la plej alta punkto, kiun ĝi iam ajn atingis. Post tio la nombro dekliniĝis 1923 kiam perdo de 1152000 montriĝis.

La plej grava difekto en la Federacio estas manko de unueco. Ĝi ne estas efektiva centra strukturo. Ĉirkaŭ 110 naciaj kaj internaciaj unuiĝoj, 49 ŝtatfederacioj kaj ĉirkaŭ 900 urbaj centraj grupoj komponigas la Federacion. Ĉiuj tiuj grupoj estas aŭtonomie paralizitaj. La mastroj tial povis senpovigi la ministojn, dum la aliaj organizitaj grupoj laboris kaj ne kontraŭstaris. La mastroj povis subjugigi la ŝtallaboristojn, dum unuiĝaj ministoj kaj unuiĝaj fervojistoj estis transportantaj karbon kaj liverantaj ŝtalon al strikrompantoj; atako kontraŭ unu el tiuj sendependaj unuiĝoj ne estas konsiderata kiel atako kontraŭ laboristaro laŭ la opinio de Sro. Gompers kaj liaj kolegoj.

Eĉ la britaj delegitoj C. F. Cramp, reprezentanto de fervojistoj, kaj A. B. Swales, prezidanto de Brita Metiist-Unuiĝa Kongreso, estis tro radikalaj por la estraro de AFL, kiam ili konsilante admonis "pli da membroj kaj malpli da unuiĝoj".

Antaŭ kiam ekstaros laŭindustrie organizita laboristaro, kiu samtempe komprenos kaj konfesos la politikan signifon de historia evoluado, la usona kapitalistaro povas dormi trankvile.

*G. Saville*

1) Samuel Gompers mortis antaŭ du semajnoj (vidu n.o 13).

2) Organizaĵo kiu konsistas el egala nombro de kapitalist-reprezentantoj, laborist-reprezentantoj kaj publik-reprezentantoj (la lastaj kompreneble estas burĝoj).

## Statistika bildo pri Hungario

I

Ĉi-ciferoj montras la pliiĝon de la prezoj de kelkaj plej necesaj nutraĵoj de 1. julio 1914 ĝis la fino de decembro 1923. Ĉi-statistiko, kiel mi pensas, pli bone konvinkos la leganton, ol la plej bone konceptita artikolo pri ekonomia stato de Hungario. Mi montras la prezojn de komenco de mondmilito, la prezojn ĉe militfiniĝo, la prezojn post komunismo kaj fine la rezulton de *nuna regado.*

| Artikloj | Kiom | 1. VII. 1914 | 1. VII. 1917 | 31. XII 1919 | 31. XII. 1921 | 31. XII. 1923 | La pliiĝo laŭ % |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Faruno . . | 1 kg | 0,42 | 1,06 | 8,92 | 36,— | 2100,— | 499,900 |
| Sukero . . | „ | 0,86 | 1,54 | 16,42 | 100,— | 8200,— | 953.388 |
| Pano bruna . | „ | 0,32 | 0,52 | 1,96 | 18,— | 1440,— | 449,900 |
| Faboj . . . | „ | 0,34 | 0,80 | 14,— | 20,— | 2600,— | 764,606 |
| Terpomoj . | „ | 0,14 | 0,30 | 1,90 | 8,— | 350,— | 249,900 |
| Rizo . . . . | „ | 0,50 | 2,20 | | 68,— | 4600,– | 919,900 |
| Salo . . . . | „ | 0,28 | 0,34 | 2,96 | 12,— | 1450,— | 517,575 |
| Ovo . . . . | peco | 0,08 | 0,42 | 6,50 | 7,— | 800,— | 999,900 |
| Kafo . . . . . | 1 kg | 4,80 | 14,40 | | 400,— | 32000,— | 666,567 |
| Karbo . . . | 100 kg | 4,60 | 9,45 | 65,— | 500,— | 38000,— | 825,987 |
| Ligno . . . | „ | 3,60 | 10,95 | 103,— | 240,— | 2150,— | 597,122 |
| Petrolo . . | 1 litro | 0,28 | 0,56 | 3,— | 38,— | 1800,— | 642,754 |
| Bovoviando. | 1 kg | 1,92 | 11,50 | 52,— | 44,— | 12000,— | 624,900 |
| Porkviando . | „ | 2,08 | 8,40 | 52,— | 90,— | 19000,— | 913,361 |
| Graso . . . | „ | 1,60 | 9,40 | 64,— | 158,— | 15600,— | 974,900 |
| Lakto . . . | 1 litro | 0,28 | 0,78 | | 18,— | 1870,— | 489,186 |

II

La ciferoj montras, kiom da horoj oni devis labori por povi akiri por si la ĉi subajn aĵojn. La ciferoj tute klare montras la ekonomian situacion de hungariaj laboristoj. Mi pensas, ke klariga aldono estas superflua.

| Por | Kiom da horoj | | | |
|---|---|---|---|---|
| | 31. VII. 1914 | 31. XII. 1919 | 31. VII. 1922 | 22. XI 1924 |
| kompleta virvestaĵo . . . . . . | 80 | 141 | 381 | — |
| surtuto . . . . . . . . . . . | 93,8 | 294 | 428 | — |
| paro da virŝuoj . . . . . . . | 20 | 116 | 61 | 82 |
| paro da infanŝuoj . . . . . . | 10,5 | 41 | 35 | 62 |
| paro da virinŝuoj . . . . . . . | 18,5 | 94 | 61 | 82 |
| vira ĉemizo . . . . . . . . . | 4 | 14 | 38 | 50 |
| paro da viraj ŝtrumpoj . . . . | 0,9 | 5,8 | 6,6 | 8 |
| paro da virinaj ŝtrumpoj . . . | 1,3 | 8,8 | 13 | 16 |
| paro da infanaj ŝtrumpoj . . . | 2 | 10 | 4,5 | 5,3 |
| vira ĉapelo . . . . . . . . . | 8,6 | 7,5 | 38 | — |
| kilogr. da pano . . . . . . . . | 0,4 | 0,09 | 2 | 1,2 |
| kilogr. da faruno . . . . . . . | 0,5 | 0,08 | 2,1 | 1,2 |
| kilogr. da bovoviando . . . . . | 2,6 | 3,4 | 5,7 | 5,4 |
| kilogr. da lardo . . . . . . . . | 2,1 | 3,4 | 12,8 | 8,8 |
| kilogr. da graso . . . . . . . | 2 | 3,4 | 13,8 | 8,4 |
| 10 kilogramoj da terpomoj . . | 1,8 | 0,9 | 8 | 5,2 |
| 1 kilogr. da sukero . . . . . . | 1.09 | 0,4 | 9,5 | 3,2 |
| 1 kilogr. da sapo . . . . . . . | 1,06 | 0,5 | 2,1 | 1,4 |
| 100 kilo da ligno . . . . . . . | 4,6 | 5,8 | 19 | 13,6 |
| 100 kilo da karbo . . . . . . | 5,2 | 4,3 | 8 | 18 |
| 10 ovoj . . . . . . . . . . . | 0,9 | 2,1 | 3 | 5 |
| 10 skatoloj da alumetoj . . . . | 0,1 | 0,5 | 1,2 | 1 |
| La meza salajro pohore | 0,75 Kr. | 8,50 Kr. | 42,– Kr. | 5,— Kr. |

*A. Schuller.*

# RUĜA HELPO

## AL LABORISTARO ĈIULANDA

*La hispana polica reĝimo ekpremis kun granda krueleco kontraŭ la revoluciaj laboristoj. Faŝistaj bandoj de Primo de Rivera aranĝas veran ĉasadon je la hispanaj proletarioj, mortigante ilin el-post angulo. Centoj da revoluciaj batalantoj estas devigataj forlasi la limojn de Hispanio. Ili elmigras por konservi siajn fortojn por plua revolucia batalo.*

*Estas devo de la laboristaro tutmonda — laŭtigi sian voĉon protestan kontraŭ la sanga reĝimo de la hispana burĝaro. La mondproletariaro devas unuanime starigi kontraŭ la blanka teroro — la proletarian solidarecon.*

*Laboristoj, kamaradoj!*

*En tiu momento, kiam la hispanaj revoluciuloj estas devigataj sin savi sur la teritorion de Francio, evidentiĝas, ke amikas inter si la kapitalistoj je la afero de premado de revoluciaj laboristoj.*

La registaro de Herriot faras lakeajn servojn al la hispana burĝaro. *La registaro de Herriot eldonis ordonon pri elpelo de la hispanaj revoluciaj laboristoj.* Ĝi intencas fordoni la hispanajn revoluciulojn al la hispanaj ekzekutistoj. Ni ne devas tion ĉi permesi. *Proletarioj de la tuta mondo, kaj precipe de Francio devas plej energie protesti kontraŭ la sanga laboro de la franca burĝa registaro.*

*Ni proponas al la laborista klaso en ĉiuj landoj, per masprotesto haltigi la malhonestan agon de la kapitalistaj mortiguloj kaj iliaj ekzekutistoj.*

*For la blankan teroron de l'internacia kapitalismo!*

*For la klasan justecon de la burĝaro!*

*Vivu la liberiga batalo de la mondproletariaro!*

*Vivu la Internacia Ruĝa Helpo!*

Ekzekutiva Komitato de Internacia Ruĝa Helpo.

## INTERNACIA RUĜA HELPO RAPIDAS AL LA HISPANAJ REVOLUCIULOJ

La Ekzekutiva Komitato de Internacia Ruĝa Helpo ĵus ricevis el Francio la komunikon pri tio, ke la hispana registaro uzis kelkon da abomenindaj persekut-rimedoj rilate la revoluciajn hispanajn laboristojn. La hispana ĝendarmaro kaj polico aranĝis veran ĉasadon je laboristaj agantoj. Tage kaj nokte persekutataj, — la dekoj de revoluciuloj savas sin forkurante trans la francian limon.

La sindikatistaj organizajoj sin turnis al C. K. de la franca sekcio de IRH kun peto pri la helpo.

Dum 24 horoj estis mobilizita la tuta aparato kaj urĝe estis organizita akceptado de la hispanaj revoluciuloj, transirintaj la limon kaj estis donita al ili necesa materia subteno. En 7 masaj mitingoj en grandaj urboj de suda Francio miloj da proletoj deklaris sian ardan proteston kontraŭ la furioza teroro en Hispanio.

Milmulta laborista mitingo en Parizo unuanime aliĝas al la frata alvoko de IRH.

Tiu ĉi helpo, rapide farita de nia organizaĵo en la okazo, kiu koncernis ne nur la komunistajn, sed ĉefe la sindikatistajn kaj anarkiistajn laboristojn, vekis grandajn simpatiojn kaj aliĝadon al IRH de vastaj tavoloj da okcident-eŭropa proletaro.

En mitingoj kaj kunvenoj la laboristoj, sendepende de siaj politikaj opinioj, kun granda entuziasmo unuiĝadis sub la standardo de IRH.

Kiel rilatis al ĉi tiuj okazintaĵoj la polico de *Erió (Herriot)?*

Estis eldonita la dekreto pri ekzilado el la landlimoj la hispanajn revoluciulojn, sin savantajn sur la teritorio de Francio. IRH sin turnis kun alvoko al la hispanaj revoluciaj laboristoj ne obei la ordonon pri ekzilado, senmaskigante la lakean politikon de la "demokrato" *Erió.*

Kion entreprenis la Ekzekutivo de IRH?

La Ekzekutivo de IRH tuj sendis ĉirkaŭ 100000 frankojn por helpo al la viktimoj de masa teroro de la hispana fipolico.

La Ekzekutivo faros ĉion eblan por ankaŭ morale helpi al la viktimoj de la blanka teroro, ke estu konservitaj iliaj forto por la plua klasbatalo.

La *Ekzekutivo* sin turnis kun alvoko al la proletaro de la tuta mondo, deklarinte proteston kontraŭ tiu ĉi nova fiago de hispana moderna inkvizicio.

# ELORIENTAJ EKBRILOJ

**Sub la influo de l'"ruĝa infekto"**

La mongolia granda *ĥuruldan* (nacikunveno) konfirmis la konstitucion de l'*Mongola Popola Respubliko.*

La supera potenco apartenos al granda ĥuruldan (nacikunveno) kaj malgranda (ekzekutiva organo).

*La konstitucio ne donas elektrajtojn al la uloj, ekspluatantaj dungilaboron.* La oficiala standardo de l'respubliko estas **ruĝa standardo** kun emblemo de l'sendependeco.

La alpreno de ĉi-konstitucio estas grava revolucia antaŭenpaŝo, atestanta pri la sukcesa porrevolucia batalo de l'orientaj popoloj.

* * *

**Jidlingva laborista Universitato**

Malfermita en Minsk (Blankrusio) estas la unika jidlingva lab. univ.-to en Sovetio. Studas 120 uloj (90% estas korplaboristoj). Ĉe la univ.-to funkcias politik-lernejo (500 stud.). —

* * *

**Ĉu sennaciismo estas superflua?**

En Tomska gubernio (Siberio) funkcias 113 lernejoj, apartenantaj al 18 (dekok!) naciecoj.

Manko de instruistoj por tiom da nacilingvoj malhelpas la pluan plilarĝigon de l'lernej-reto.

* * *

**En la ruĝa Meko**

La intenseco de l'strat-cirkulado elvokis la necesecon konstrui en Moskvo "metropolitenon" (subteran urbfervojon). La unuaj laboroj estas komencitaj. La unua linio, priservonta la centrajn kvartalojn de Moskvo, estos jam funkcianta en komenco de 1928.

* * *

**"For la diojn el la ĉielo, kapitalistojn elsur tero"**

La Societo de Amikoj de l'gazeto "Bezboĵnik" (Sendiulo) aranĝis en Moskvo sian unuan masdemonstracion tra la stratoj de l'urbo. La societo jam nombras 5000 anojn.

Okaze de l'VII-jaro de Oktobra Revolucio la laboristoj de l'uzino "Prejss" aranĝis festan "dio-bruligon": oni bruligis 2000 sanktajn bildojn (surmuraj ikonoj) libervole fordonitaj de l'laboristoj eks-kredulaj.

**Dujaro De l'"Ruĝa Helpo"**

La Internacia Organizaĵo de helpo al revoluciuloj, persekutitaj de l'kapitalo (mallong. Ruĝa Helpo) estis fondita en nov. 1922 laŭ la iniciato de l'rusiaj societoj de *Malnovaj Bolŝevikoj* kaj de *Eks-punlaboruloj kaj — ekziluloj.*

R.H. nombras *4 000 000 membrojn* en la mondo (34 landsekcioj). Precipe disvastigita ĝi estas en Sovetio, kie ĝi kalkulas en siaj vicoj *38 000 grupojn el 105 gubernioj, regionoj kaj respublikoj.*

La organizaĵo disvolvis grandan helplaboron por la arestitoj kaj iliaj familioj precipe en Germanio, Bulgario, Rumanio, Hungario, Polio, Italio, Baltiklandoj t. e. tie, kie la reakcio estis plej aktiva.

R. H. aranĝas sukcesan inform-propagandan agadon: aperas ruslingve semajna "Vojo de R. H. (MOPR.)", 150 000 ekz., dusemajna "MOPR.", monata Bulteno de R. H. (70 000); aperis 12 broŝuroj kaj kinofilmo "Ruĝa Malfronto". En Francio, Germanio, Italio, Polio kaj cet., eldonaĵoj aperas plejparte nelegale.

R. H. ekspedis dum 1923-1924 al la persekutitoj kaj iliaj familioj 1 300 000 rub. (ĉ. 585 000 dol.) Ĝi enspezas ĉiumonate ĉ. 100 000 dol.

*Dneprano.*

## Esp.-movado en Ekstrema Oriento

*Ĉita* (Ekstrema Oriento, Siberio, 80000 loĝ.). La movado kreskas Esp. precipe disvastiĝas inter proletinteligenta junularo. Laboris rondetoj ĉe 3 duagradaj lernejoj, po unu ĉe politeknika kaj profesiteknika lernejoj. Krom tio funkcias kursoj ĉe la laboristfakultato, tabak- kaj ledfabrikoj kaj infandomo. Gvidas k.doj Bajenov kaj Usolcev. Oni intencas lernigi esp. en aliaj lernejoj de l'urbo. — Ekzistas "urba komitato de lernantoj"; ĝi gvidas tutan laboron. En lokaj gazetoj lasttempe aperis gravaj artikoloj, ekz: Kio estas SAT, Kongreso de SAT ktp. SAT-sekcio studas interne sennaciismon. Estas atendata kun la lernsezono pliviglîgo, same en *Blagoveŝĉensk* sur Amur-rivero, kien revenis el Moskvo fervora k.do Borisoglebskij. Ĝenerale ekzistas ankoraŭ antaŭjuĝoj kontraŭ nia lingvo inter laboristaro, kiuj estas precipe subtenataj de inteligentuloj.

*N. L.*

# DIVERSAĴOJ

### Kulturo aŭ malhonto?

Sur stratoj de Moskvo sin montris tute nudigitaj viroj kaj virinoj, kun rubandoj pendigitaj super ŝultron kaj surskriboj "for la honton!" Demandite de rusiaj ĵurnalistoj popola komisaro por san-protektado, k.do Semaŝko, eldiris jenan opinion rilate al tiu devizo:

"Tiun ĉi konduton oni devas prikonsideri ĉiuflanke. Unue, — oni opinias malprave, ke la kulturo de proletaro estas antaŭ ĉio absoluta malakcepto de kapitalisma kulturo. Plej evidente eraras tiuj, kiuj kredas, ke per esti tute nuda, havi maltonditajn harojn kaj maltranĉitajn ungojn, oni elmontras veran revoluciemon. Tiu ĉi aserto estas absurda. La proletara kulturo celas utiligi por laborantaj masoj ĉiujn kulturakiraĵojn per senigi je ili la ekspluatantojn. Due, — la promenado tra moskvaj stratoj kun korpo tute nuda estas malaprobinda pro la motivoj de higieno. Oni ne devas lasi la korpon por influo de polvo, koto kaj pluvo. La vestaĵo estas destinita por protekti nin kontraŭ akraj veterŝanĝoj, polvo kaj malbonaj kondiĉoj de l' ekstera medio. Kompreneble, sur marbordo en sudaj regionoj, sub la suno kaj freŝa aero, post la bano en maro, estas utile kuŝi sur la sablo tute nude. Sed la stratoj de Moskvo ne estas ripozloka marbordo. De l' higiena vidpunkto tia nudiĝo kaj vagado tra la stratoj estas malsaĝa.

Trie, estas tre diskutinde, ĉu tiu ĉi novaĵo ne estas malutila por moraleco. En la nuna momento, kiam ne estas eliminitaj la prostituo, maldisciplineco, la absoluta nudiĝo akcelas nur la malmoralecon. Tial mi opinias, "konkludis k.do Semaŝko," ke estas necese forigi tiun ĉi nekonvenaĵon, eĉ se estas necese, per punrimedoj. *N. Krassovskij.*

**Alkoholleĝo en Usono.** Al kelkaj demandantoj nia Nov-Jorka korespondanto sciigas, ke la alkoholmalpermesa leĝo ne estas nuligita; sed nova juĝdecido permesas fabrikadon de alkoholaĵoj por propra privata uzado.

---

### Alvoko al la proletaj organizaĵoj el ĉiuj landoj

*De la redaktoro de* "Laborista Sporto" *ni ricevis sekvantan alvokon por enpreso. Ni nur bedaŭras, ke laŭ ĝi ne* ĉiuj *laboristaj sportuloj povos partopreni ĉi-olimpiadon, sed nur anoj de Lucerna Internacio. Tio ne estas signo de bona volo por* unuecfronto.
*Red.*

Karaj gek.doj! Nia intern. unio, kiu kalkulas 1 300 000 anojn loĝantaj en 17 landoj, okazigos fine de julio 1925 en Frankfurt-Main (Germanio) *la unuan laboristan olimpiadon.* Ni volas ke tiu tutmonda sporta festego estu pruvado de tio kion signifas lab. sporto kaj samtempe la sola okazo por proklami nian amon al la paco kaj la intern. interfratiĝo. Organizota en la belega stadio de la urbo Frankfurt, la lab. olimpiado 1925 depost hodiaŭ estas certa je granda sukceso. La organizlaboro estas konfide komisiata al la germ. k.doj. Oni povas esti certa, ke interkonsente kun la intern. komitato, ili faros ĉion eblan, por ke olimpiado montru nian potencon. Gimnastike, atletisme, piedpilke, naĝsporte, biciklosporte kaj sportlude ni volas montri al ĉiuj sportuloj ke oni scias pli bone agi ol niaj kontraŭuloj kaj ke nia percepto respondas al la bezonoj de la proletaro. Ĉiuj nacioj aliĝintaj al la internacio de *Lucern* povas partopreni je la lab. olimpiado. Ne nur povos ĉeesti la nacioj kiuj estas anoj de la Internacio de Lucern, sed ankaŭ ti-kiuj aniĝos antaŭ julio 1925 kaj promesos respekti ĝian regularon. Ni esperas, ke ĉiuj sportemaj lab.istoj volos partopreni al la unua lab. olimpiado kaj ke ili tuj sin preparos. Frankfurt ne devas esti demonstracio, je kiu oni nur gloras la venkon de individua kapableco sed demonstracio de tutm. lab. sportanaro, kuniĝanta pro amo al la saniga fizika kulturo. Ĉiuj junularoj devas aliri Frankfurton, por krei veran senton de intern. amikeco kaj malaperigi malbelan vizaĝon de militarismo. Tial ĉie oni ŝparu kaj ĉiuj diru: Ni iru al Frankf. 1925 kaj vivu la internacio de la lab.istoj, kiu estigos la tutm. pacon.

Por la internacia komitato

La prezid. — *Gaston Bridoux* (Belgio)
La sekret. — *Jules Devlieger* (Belgio)

La komitatanoj: *Gellert kaj Wildung* (Germanio), *Guillevic* (Francio), *Silaba* (Ĉekoslovakio).

Trad. el franca Leon. Lenzen filo, Verviers (SAT 1924)

---

**Se vi deziras la kreskon de S.A.T., disvastigu ĝian organon!**

### Labortempo en Nov-Zelando

Registaro kaj kapitalistaro estas provintaj enkonduki en Nov-Zelando tra la tuta lando la 48horan laborsemajnon. La laborista ligo en Nov-Zelando nun estas sciiginta la registaron, ke ĝi malobeos al ĉiu ajn plialtigo de la labortempo en laborejoj kie estas laborata nur 44 horojn. Ne malpli ol 79 procentoj de la laboristaro de Nov-Zelando jam posedas la 44laborhoran semajnon kaj minacas ekkomenci malpacojn, se okazus, ke la 44hora semajno ne estus ĝenerale respektata. *3675*

---

## Inter ni

Kvankam malmulte da k.doj povis ĉeesti la IVan Kongreson de SAT, ni povas tamen diri nun, ke ĝi estis la plej grava kaj signifoplena. Ties gravecon trafe montras la fakto, ke kelkaj lab. organizaĵoj sendis delegitojn. Ke niaj laboroj en Bruxelles estis fruktoportaj, tion ni povas konkludi el la granda nombro da gazetoj ĉiulingvaj kiuj raportis pri nia Kongreso. Ĉiu sincerulo devas ja konfesi, ke tio estas plej trafa, grandskala propagando. Menciinda estas ankaŭ la fakto, ke granda nombro da gazetoj represis la "Deklaracion" de k.do Nathans, kiun ni publikigis en la n.ro 1 de *Sennaciulo.* Kaj rezultas el tio, ke nun kelkaj lab. organizaĵoj tre simpatias esp.on.

Malgraŭ tiuj tre kontentigaj faktoj, estas tamen kelke da malkontentuloj. Tial ke ilia vidpunkto ne trovis aprobon ĉe la Kongreso, kelkaj k.doj disfamigas plej fantaziajn dirojn. Ili tiom fidas sian saĝecon, prudenton, ke eble sincere tiuj malkontentuloj opinias, ke se iliaj proponoj ne estis akceptataj, tio rezultas sendube el io nenormala, mistera, diableca. Iu k.do eĉ skribis, ke la IVa estis "teatraĵo"!! Oni ja povus simple ignori tiajn dirojn, sed eble kelkiuj konkludus el tio, ke efektive regis ĉe la kongreslaboroj io nenormala. Tial, por klarigi la aferon kaj neniigi la fantaziajn dirojn de kelkaj malkontentuloj, ni petis al la 1a Prezidanto, k.do Léon Bergiers, membro de la *Laborista Partio Belga,* ke li bonvolu respondi jenajn demandojn:

1) ĉu la kongres-laboroj disvolviĝis konforme al nia Asocia Statuto, al nia kongres-regularo kaj ĝenerale laŭ la kutimo de la laboristaj internaciaj kongresoj?
2) ĉu la Komisiono (por studi la diversajn proponojn) estis libere kaj regule elektita?
3) ĉu tiu komisiono laboris libere, izole kaj memvole, aŭ ĉu ĝi laboris sub la influo de iu tendenco?
4) ĉu kronologie la Kom-frakcia kunveno povis influi la debatojn de tiu Komisiono? (Ja, la Komisiono finis sian laboron posttagmeze, kaj nur kelkajn horojn poste kunvenis la Kom-frakcianoj).
5) ĉu ĝenerale la Kongreso estis "Teatraĵo"???

**Respondo de k.do Bergiers**

*al la 1a demando:* "mi ĉeestis plurajn internaciajn Kongresojn kaj povas konkludi (komparante kun nia IVa) ke nia kongreso superis la de mi vizititajn internaciajn kongresojn. Nur sola afero estis hezitema: la Prezidanto. Estas memkompreneble, la kutimoj ne estas samaj, kaj sekve estas tre malfacile prezidi alikutime. Sed tio ne longe daŭris, tuj mi kutimiĝis. La komenco de l'kongreso estis iom senorda, sed la tuta kongreso estis ege justa kaj senpartia"!

*al la 2a demando:* "Kompreneble jes! kaj mi opinias eĉ ke la kongresanaro taŭge elektis tiun komisionon. Tiuj komisionanoj estis laŭ mi spertaj en tiu fako".

*al la 3a demando:* "La komisiono tuj post sia elekto apartiĝis kaj diskutis izole kaj memvole. Mi neniam studis la spiritismon por juĝi pri sekreta influo".

*al la 4a demando:* "Mi ne kredas! sed mi ne povas aserti ke la komunistaj k.doj ne kunvenis ie antaŭe en sekreto. Sed mi nenion rimarkis".

*al la 5a demando:* "Se jes, mi estus ludinta ĉefrolon! Ĉar mi neniam lernis la teatran arton, mi ne kredas esti ĉefrolulinda"! Tio estas mensogego!!" *(L. Bergiers.)*

Al tio ni aldonos nenian komenton. Ni tamen esperas, ke la malkontentuloj fine komprenos, ke se iliaj proponoj ne trovis aprobon ĉe la Kongreso, tio simple rezultas el la fakto, ke la plimulto da kongresanoj havis alian opinion ol la proponintoj.

Cetere, finfine decidu pri tio la ĝenerala voĉdonado.

* * *

Rilate la financan flankon de la Kongreso, ni ankaŭ povas esti plene kontentaj. La ĉi suba bilanco montras, ke male je la burĝa kongreso kiu rezultigis 3000 dolaran deficiton, ni per niaj modestaj fortoj sukcesis havi eĉ ioman profiton. Se oni konsideras, ke la kongresaranĝintoj eldonis afiŝojn, kiuj larĝe propagandis pri nia afero en Bruxelles, kaj ke ili plie organizis en Luxemburg, la idista nesto, propagandkunvenon postkongresan,

pro kies anonco estis ankaŭ eldonataj afiŝoj, oni nepre devas konkludi, ke la Bruxelles'aj SAT-anoj plej ŝpare utiligis la kongresenspezojn.

Ili do povas ankaŭ malatenti la kritikojn de la malkontentuloj.

*Ekzekutiva Komisiono de SAT.*

## Bilanco financa de la IVa Kongreso

**Enspezoj**

| | |
|---|---|
| Kotizoj, municioj, vendo de poŝtkartoj kaj fotografajoj . . . . . . . . . . . . (plus mono neŝanĝita: 1 dol., 20 f. mk., 100 rubl. l., 1 rubl. r., 10 000 kr. a.) | fr. belg. 2 498,91 |

**Elspezoj**

| | |
|---|---|
| Luo de la ĉambrego, aĉeto de poŝtmarkoj, foto., afiŝoj, afiŝado, Luksemburga konferenco, ktp. . . . . . . . . . . . . . . | fr. belg. 2 253,06 |
| Restas en kaso (plus mono diverslanda ĉi-supre menciita) | fr. belg. 245,85 |

La kongres-komitato proponas dividi la saldon po duono a la loka grupo Bruxelles'a kaj al SAT.

La K. K.-anoj: *Basteels* (kasisto), *Van Aelst* (sekretario), *Bergiers, Szerman, Glineur, Springael, Serverius.*

La Ekz. Kom. aprobis tiujn kalkulojn kaj ankaŭ la proponon pri divido de la saldo.

## Lingvaj studoj

Revoluciulo ne povas same rilati al lingvaj demandoj kiel burĝo. Revoluciulo celas estonton. Burĝo (aŭ ne progresema homo) regas estanton kaj tial li nature ne emas al perfektigoj, kiuj devas krei estonton. La vivo de la lasta devas esti pli intensa, ol la nuna. Tial ĝi bezonas pli moveblajn, pli facile kaj ekonomie uzeblajn ilojn. Nuna burĝo kontentiĝas de nunaj ne sufiĉe perfektaj, antikve pezaj maŝinoj funkciigataj de sklavoj — laboristoj. Tial li estas indiferenta al ĉiuj plisimpligoj de laboriloj krom kiuj donas senperan monprofiton.

Lingvo estas laborilo organmaniere ligita kun korpo de homo. Kaj same kiel ĉiuj aliaj iloj lingvo bezonas plisimpligojn por esti pli konforma al venanta pli intensa ekonomia vivo de Novo. Mi aludas plisimpligon similan al tiu de vaporturbino kompare kun piŝtmaŝino. La unua estas pli simpla kaj ekonomia, ol la dua. Lingvo de Venanto devas esti pli facile uzebla, pli ekonomia. Pro tio gramatiko de ĉiuj lingvoj simpliĝas, ĝiaj reguloj ĝeneraliĝas, formoj kaj vortoj mallongiĝas, sed ne pro iuj misteraj fonetikaj leĝoj de burĝaj sciencistoj.

Psikologia afero estas, ke burĝoj estas indiferentaj aŭ malamikaj al ĉiuj reformoj kaj ŝanĝoj, kiuj celas intereson de masoj, aperantaj sur monda scenejo de l'fabrikado. Nature ili malemas al ĉiuj modernaj ŝanĝoj en lingvo, ĉar la ŝanĝoj en esenco celas fremdajn interesojn. Rusaj kontraŭrevoluciuloj pruvas ĝin plej klare — ili ĝis nun malemas al nova ortografio, kiun abrupte simpligis soveta revolucio (estas forigitaj 5 superfluaj literoj el rusa alfabeto kaj multaj kaprompantaj gramatikaj reguloj). Burĝo kaj proleto nature ne povas same rilati al lingvaj demandoj. Vidu junian numeron de S. R., en kiu instruita doktoro Dietterle sagace protestas kontraŭ mallongaj formoj kaj vortoj, proponataj de proleto Lanty. Evidentas, ke ĉi-scienculo tute ne kapablas eĉ kompreni, ke temas pri interesoj de klaso kaj estonto! Pravas rusaj bolŝevikoj, kiuj ne fidas al instruitaj "inteligentuloj" kaj obstine pelas ilin! Ni devas esti tre singardaj rilate al konsiloj similaj al tiuj de Dietterle. Al lingvaj demandoj ni devas havi propran vidpunkton. Por ĉi celo "Sennaciulo" dediĉas apartan fakon nomitan "Lingvaj studoj".

Sendu viajn prilingvajn dubojn kaj proponojn senpere al gvidanto de ĉi-fako laŭ la adreso: Sovet-unio, Irkutsk, Gubfo, al

*Maksim Krjukov*

### Baloto pri nova Direkta Komitato

*2a listo de Kandidatoj kiel ordinara D. K.-ano* por la 7a sektoro: k.do Demidjuk G., Sadovaja-Triumfalnaja 11, lĝ. 5, Moskvo, por la 30a sektoro: k.do Weder Theodor, 429 n. 35 th Str. New York N. Y. (la unua listo estas korektota jene: k.do Stöber nin sciigas, ke li malklare esprimis sian penson; li sin prezentas kiel kandidaton al la *ordinara* D. K. kaj *ne* al la ekstra D. K.)

## Fragmentoj el "Dek jarojn en Persio"

13) *E. Rebrik*

Tre solene oni pasigas Novruzon en ŝaha palaco. En tiu ĉi tago Ŝaho ricevas en palaco gratulojn pri bona novjaro de veziroj kaj fremdlandaj diplomatoj. Poste Ŝaho sidiĝas en granda malferma salono sur trono, ĉirkaŭita de ministroj. Ĉefa mudjtehido gratulas ŝahon dezirante bonan novjaron kaj legas preĝon en araba lingvo, poste parolas ankaŭ arabe kortegula poeto, kiu devas prepari por Novruz specialan odon en gloro de Ŝaho, kaj fine kortegula astrologo faras siajn antaŭdirojn por prospera kaj feliĉa novjaro. Ŝaho per du-tri vortoj dankas ilin. Poste komenciĝas parado. Tondras orkestroj, paradmarŝas militistaro de ĉiuspeca armajo: kozakoj, ĝendarmoj, ŝaha gvardio, policistoj kaj kadetoj.

Vespere sur la arsenala placo aŭ antaŭ ŝahpalaco oni aranĝas grandiozan fajraĵon kun muziko.

* * *

Islamo ordonas al tutaj siaj adeptoj fasti unu monaton ĉiujare. Tiu ĉi estas Ramazan — monato de musulmana luna jaro. Tamen islamanoj komprenas faston ne kiel absoluta abstinenco je nutrado, sed kiel rifuzo de manĝado dum tago. Nokte do ĉiu povas manĝi, kion li volas. Ekstere persoj gardas faston, kaj vi ne trovos unu kuraĝulon, kiu arogus manĝi tage en ĉeesto de aliaj homoj. Dum tago neniu arogas eĉ fumadi sur la strato, ĉar tio estas ankaŭ malpermesita.

Post vespera preĝo en momento de sunsubiro ĉiu rapidas hejmen por fini la faston. Tutan nokton oni manĝas, oni promenas sur stratoj, kantas, ludas, unuvorte aliformigas nokton en tago. Frumatene pafas la pafilego kaj tio signifas komencon de tago t. e. finon de manĝrajto. Post matena preĝo oni dormas.

Nur dum tagmezo eliras el domoj komercistoj, malfermas magazenojn, oficistoj iras en oficejon kaj ĉiutaga vivo komencas. Sed tutaj venas ankoraŭ dormemaj, lacaj kaj aferoj marŝas malbone.

Junularo kaj kleraj klasoj (kleraj en eŭropa senco) certe ne gardas faston, sed faras tion kaŝe, sekrete, ĉar timas ankaŭ mudjtehidojn, kies influo estas granda. Junularo ridas pri hipokrita "fasto" kaj preparas sin al tempo, kiam ilia spirito estos liberigita de religiaj ĉenoj.

### 7. Revolucio en Gilan 1920—21

18a de majo 1920 estas signifa dato en historio de urbo Enzeli kaj tuta provinco Gilano. Je sesa horo matene loĝantaro de urbo estis vekita kaj treege alarmita de pafado el pafilegoj. Ti-kiuj atendis ĉi tagon, tuj komprenis, ke bolŝevika eskadro jam alvenis al Enzeli. Efektive sur la horizonto estis videblaj 15 ĝis 20 vaporŝipoj, kiuj tre trafe eljetis unu obuson post alia sur vilaĝon Kazian, kie estis dislokitaj tendaro de angla kaj hinda taĉmentoj, stabo kaj aliaj anglaj oficejoj.

Post duonhoro ĉiuj, kiuj havis spiritposedon observi bombardadon, povis vidi kiel angla ŝipekstermanto rapidis kun blanka flago en maron videble por trakti pri kapitulaco. Post ankoraŭ duonhoro tuta urbo jam konis, ke bolŝevika eskadrestro donis al angloj 12 horojn por forlasi Enzeli — Kazian. En sama tempo malmultkvanta bolŝevika taĉmento okupis gravan strategian punkton inter Enzeli kaj ĉefurbo de provinco Reŝt.

Stranga kaj eĉ ridinda estis tia rapida reiro de anglaj-hindaj taĉmentoj, tiom pli, ke dum du lastaj monatoj antaŭ tio angla milita komandantaro montris tre viglan aktivecon por defendo kaj gardo de Enzeli. En golfo estis starigita unu barkego kun malproksimportanta pafilego; sur bordo de maro hindoj-sapeistoj[1]) kavigis tranĉeojn, konstruis kaŝitajn redutojn, aranĝis fadenbarojn, konstruis liniojn de subtera telefono, starigis elektrajn reflektorojn, konstruis hospitalon, soldatejon k. a. Unuvorte Enzeli fariĝis unuagrada fortikajo, kaj neniu kredus, ke tutaj tiuj ĉi konstruajoj estis detruotaj kiel kartkastelo.

Kial do alvenis bolŝevika milita ŝiparo en neŭtralan persan havenon? Eskadrestro deklaris, ke bolŝevika militeskadro venis kun sola celo elkonduki el Enzeli tutan militŝiparon de blanka generalo Denikin internigitan en Enzeli. Tamen pasis unu semajno, pasis alia . . Blanka ŝiparo estis jam elkondukita, sed ruĝa armeo ne foriris. Male. Multaj militaj oficejoj plifortigis sian laboron. Ekzemple, komitato de milittrofeoj rekviziciis kaj konfiskis egajn kvantojn da diversspecaj komercajoj de blanka gvardio kaj rifuĝintaj komercistoj. Garnizonestro kaj komandanto malfermis siajn oficejojn. Post unu semajno regimento de ruĝa armeo okupis urbon Reŝt.

Kio do okazis? Kial bolŝevikoj ne forlasis Gilan?

1) tranĉefosistoj.

(Daŭrigota)

# RECENZEJO

**Libroj**

**Radio-Esperanto-Kurs** de *Hans Koch,* München. Eldonejo: Süddeutscher Esperanto-Verlag O. Ziegler, Deisenhofen bei München. — 52 pĝ., Formato 10½×15 cm., Prezo 0,40 mk.

Tiu lernolibreto enhavas ĉiujn necesajn elementojn de la esp. gramatiko kaj multajn ekzercojn. Kompreneble, kiel mem diras la aŭtoro, ĝi ne povas anstataŭi kompletan lernolibron. Ĝi ĉefe havas propagandan valoron, kion jam celas la aktuala vorto "radio" en la titolo. Kiel tia ĝi estas rekomendinda al germanl. propagandistoj. Entute la aranĝo de l'enhavo montras grandan spertecon de l'aŭtoro.

**Jarlibro** de la *Lingva Komitato* kaj de ĝia *Akademio,* kompilita de Th. Cart. Esperantista Centra Oficejo, 51 rue de Clichy, *Paris.* Prezo 1 fr., 16 paĝ.

**Gazetoj**

**Represis artikolojn:** *Drapeau Rouge,* Bruxelles, 10. 12., Persekutoj en Polio (S. 5), *The Young Socialist,* Bradford, dec., Murmansk, la fenestro de Sovetl. (S. 5), *Työmiehen Viikkolehti,* Helsinki, n.o 11, Kelkaj sukcesoj ĉe neŭtraluloj (S. 10), Respondo (S. 9), *Le Libertaire,* Paris, 12. 12., Persekutoj en Polio (S. 5).

**Enpresis div. notojn:** Ляпек, Ĥarkov (n.o 2), esperanto-kurso. "Sjömannen" gaz. de la svedaj maristoj, "Signalen", gaz. de la sved. fervojistoj, "Jernbanemanden", gaz. de la norv. fervojistoj, "Lokomotivmännens Tidning", gazeto de la sved. maŝinistoj enhavis la artikolon "Esp. kiel batalilo" de k.do Nathans. *Svenska Arbetar Esperantisten* presigas en sia dec. n.o interesan fruntartikolon de k.do *Edo Fimmen:* Esp.o kiel helpilo en liberiga batalo de lab. klaso.

# KORESPONDADO

**TARIFO**

**Korespondado: Unu enpreso:** Simpla dulinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

*MALLONGIGOJ:* L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* PI = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.

**Belgio**

Esperantista Lab. Aspiranta Grupo de Bruxelles, dez. koresp. kun simila grupo — k. ĉ. l. Adr.: *Alfred Van Gerfsom,* rue Gustave Defnet, 72, *St. Gilles-Bruxelles.*

**Bulgario**

K.do *Georgi Konstantinov,* St. M. Ponoret, 24, *Plovdiv,* dez. koresp. k. ĉ. l. interŝ. PM. k. vidajojn.

K.dino *Maria Giĉeva,* str. Volov, 4, *Plovdiv,* dez. koresp. k. ĉ. l. interŝ. nur vidajojn. Ĉiam resp.

K.do *Georgi Slovav,* st. eb. Ivan Zilski, 1, *Plovdiv,* dez. koresp. k. ĉ. l. interŝ. L. k. vidaĵojn. Ĉiam resp.

K.do *Berhion Rehor,* st. Doktor Valkonov, 41, *Plovdiv,* dez. koresp. k. ĉ. l. interŝ. L. gaz. vidajojn. Ĉiam resp.

*"Ivan Matev"* Nikolaevska, *Gabrovo,* ŝanĝis sian adreson, provizora adr. ĝis fino de majo 1925, *Ivan Matev,* Spahalar-Ortakjoj. Sciigo al miaj korespondantoj.

**Estonio**

K.do *Jaan Reigas,* 6. jalgv. rügement, 2. kompanii, *Pàrnu,* PI. k. ĉ. l. Tuj resp.

**Germanio**

K.do *Fritz Lahr,* Chemnitzer Platz, 1, II. *Glauchau i. S.,* pri ĉ. temoj, L, PI, bfl. k. ĉ. l. Tuj resp.

K.do *Kurt Floss,* Friedrichstr. 7, I. *Glauchau i. S.,* PI, bfl. k. ĉ. l. Tuj resp.

K.do *Neumann, Gustav,* Hermannstr. 36, *Essen,* L, PK, PI, k. ĉ. l.

K.do *Herbert Herold, Oberlungwitz i. S.* — (SAT 2926) pri malsanulasekurado k. ĉ. l. ankaŭ k. Rusio.

Seriozuloj estas petataj, konigi siajn adresojn.

"Deziras interŝanĝadon de PM, k. ĉ. l. Sendu unue." Adr.: *H. Wolfschmitt,* Klenzestr. 99, I. r., *München.*

*Höller, Ewald,* Bergstr. 1, *Mettmann,* pri geografio, interŝ. de geograf. kartoj, L, PK, PI, k. ĉ. l.

**Litovio**

Lernanto *Marjan Pagiraitis,* Bajoruos, 9, *Rokiŝkis,* k. ĉ. l. samideaninoj, esp., lit., rus.; pol. k. germ. lingvoj.

**Rumanio**

Partoprenintoj de jus finita kurso perfektiĝcele dez. koresp. p. ĉ. t. L, PK, PM. Adr.: *Johano Rózsahegyi,* str. Decebal, 6, *Deva.*

**Sovet-Unio**

K.dino *Kazina Olga,* ul. Zencova, 166, *Ufa,* pri ĉ. temoj, prec. filozof. moroj, vojaĝoj, religio, politiko ktp. L, PK, PI, k. ĉ. l.

K.do *P. Nikitin,* Kalanĉerskaja pl. 1, Krasnoprudski per ½ kv. 7, *Moskvo,* pri turismo, interŝ. fotojn, PK, PI.

# KORESPONDEJO

*2149* (Astrakan). Se vi vere opinias, ke via protesto povas iel influi la Francan Registaron, kial do vi ne sendis al ĝi *senpere* vian proteston? Tempon kaj monon mi ne havas por zorgi tiajn aferojn. *E. L.*

*1998.* Tian grupon en Azio ni ne konas. Monsendojn ĉiam direktu rekte al la administracio en Leipzig. La ciferon de vi deziratan ni ne povas doni al vi. *N. B.*

*Vivulo.* Via artikolo estos uzata. *N. B.*

*I. G. Suranskij R.* *Ĉiukaze* samsignifas kun *ĉiuokaze* (estas plisimpligo de la nebela formo kun du kunpuŝiĝantaj vokaloj). La "ĝuado", pri kiu vi parolas, bedaŭrinde ofte malestas pro nelaboremo de multaj. *N. B.*

*3675.* Ni preferus ricevi tiajn sciigojn per SAT-anoj el la koncernaj sektoroj mem. Tamen ni utiligos laŭbezone. Pri la aludita kongreso ni atendas raporton. *N. B.*

# Nia Libroservo

Ni ĵus reorganizis tiun servon tiel, ke de nun ni povas liveri ĉiujn verkojn esperantlingvajn, aŭ rilatajn al esperanto, eldonatajn de aliaj firmaoj.

**1a listo de verkoj**

Eldonaĵoj de SAT (vidu nian specialan katalogon)

**ALIAJ ELDONAĴOJ** (petu nian 2an katalogon)

| | |
|---|---|
| **Fundamento de Esperanto** (in. 16, 188 paĝoj) . . . . . | 3 f. fr. |
| **Fundamenta Krestomatio** (in. 16, 460 paĝoj) . . . . . . | 9 f. fr. |
| **Hamleto,** de Shakespeare (in. 16, 170 paĝoj) . . . . . | 5 f. fr. |
| **La Rabistoj,** de Schiller (in. 8, 144 paĝoj) . . . . . . | 4 f. fr. |
| **La Revizoro,** de Gogol (in. 8, 100 paĝoj) . . . . . . | 4 f. fr. |
| **La Faraono,** de Prus (3 vol. in. 8, po 194, 238, 191 paĝoj) ĉiu vol. . . . . . . . . . . . . . . | 6 f. fr. |
| **Vivo de Zamenhof,** de Privat, ilustrita (8, 206 paĝoj) . . | 10 f. fr. |
| **Marta,** de E. Orzeszko (in 8, 237 paĝoj) . . . . . . | 10 f. fr. |
| **Eŭropo ĉe Abismo,** de F. Nitti (in. 8, 178 paĝoj) . . . . | 15 f. fr. |
| **Vortaro de Esperanto,** de Kabe (in. 8, 175 paĝoj) . . . . | 8 f. fr. |

**Francilingvanoj!**

Bona afero por vi!

**"Larousse Universel"** dictionnaire en 2 volumes eldono 1924, — formato 20×29, — 1276+1292 paĝoj lukse bindita "Demi-chagrin", stato absolute nova, — favoraj prez-kondiĉoj.

Informojn ĉe **SAT, 23 rue Boyer, PARIS XX.**

| | |
|---|---|
| **Cours Rationnel et Complet d' Esperanto** (in. 16, 208 paĝoj) | 5 f. fr. |
| **Cours Elémentaire d' Esperanto** (in. 16, 36 paĝoj) . . . . | 0.50 f. fr. |
| **Dictionnaire complet Esperanto-Français,** de Grosjean Maupin (in. 16, 288 paĝoj) . . . . . . . . . . . | 6 f. fr. |
| **Dictionnaire complet Français-Esperanto,** de Grosjean Maupin (in. 16, 672 paĝoj) . . . . . . . . . . . | 12 f. fr. |

La mendojn oni adresu al k.do **R. Lerchner,** Colmstrasse 1, III., **Leipzig** (Germanio) aŭ al k.do **Banmer, L.,** 23 rue Boyer, **Paris XX** (Francio).

La kliento pagas la sendkoston, tiom estas: 15% el la mendo por ekspedo enlanda, 30 % por ekspedo eksterlanda. Ĉiuj sendaĵoj estas rekomenditaj. Ni ekspedas nur post pago.

**Akiru akciojn de la Eldona Kooperativo!**

**Jarabono:** Argentino 6 pesos; Aŭstrio 120000 kr.; Belgio 36 fr.; Brazilo 13 milr.; Britio 110 penc.; Bulgario 220 lev.; Ĉeĥoslovakio 60 kr. ĉ.; Danio 10 kr. d.; Estonio 650 mk.; Finnlando 70 mk.; Francio 35 fr. fr.; Germanio 8 mk. or.; Hispanio 13 peset., Hungario 8 kr. or.; Italio 36 lir.; Japanio 4.50 jen; Jugoslavio 130 din.; Litovio 16 lid.; Nederlando 6 guld.; Norvegio 14 kr. norv.; Polio 8 zlot.; Portugalio 40 esk.; Rumanio 350 lej.; Rusio 4 rubl. or.; Svedio 8 kr. sved.; Svisio 10 fr. svis.; Usono 2.50 dol. — Ankaŭ ¼ jare abonebla.

Presejo: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG